DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (973) • 2025 •



Far Andy Stuardo L. - Flickr, CC BY-SA 2.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=969203

Kristo de la Andoj

Vidu p. 92

KELI
Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe Cousson
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel Polnický;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes Ráczkevy-Eötvös
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof Åradsson
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel Polnický

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. 💻 info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Kiu estas la plej granda	75
Ekumena diservo kadre de UK en Brno	79
Li renversas la miton pri perforto en la nomo de religio	80
Biblia vorto kaj mia penso	83
La dekunua ordono: “Ne estu indiferentaj!”	84
La mortomeritaj pekoj – malnovaj kaj novaj	88
La Kristo de la Andoj	92
Bibliaj tagoj - Aliĝilo	94
Kanto: En li, Kristo, la unu	96

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, jen nova interesa numero de Dia Regno. Ĉu vi trovas iun ruĝan fadenon inter la diversaj artikoloj? Mi devas konfesi, ke plej ofte mi ne havas iun temon kiam mi komencas kolekti materialojn por la gazeto, sed dumvoje mi ofte povas vidi iun komunan temon aŭ la diversaj tekstoj direktas miajn pensojn en iun direkton.

Ĉifoje mi levus mian rilaton kun Dio, la bazo de mia kredo. Kion rolas tiu rilato en mia vivo? Ĉu tiu mia rilato influas mian sintenon kaj mian agadon, kaj ĉu ĝi donas al mi kuraĝon montri aŭ laŭte opinii, kiam mi vidas ian maljustecon? – Mi esperas ke jes!

Kara leganto, mi volonte akceptus ian malgrandan rakonton pri iu travivaĵo de vi. Certe vi ion faris somere – eble legis iun interesan libron, kaftrinkadis kun malnovaj geamikoj aŭ simile. Grande aŭ malgrande – raportu kaj ĝojigu aliajn legantoj!

Kiu estas la plej granda

Prediko dum Universala Kongreso en Brno 2025

Pastoro Wolfram Rohloff, DE

Graco estu kun Vi kaj paco de Dio nia patro kaj de Jesuo Kristo, nia sinjoro. Amen.

Karaj gefratoj, ĉu hazarde iu el Vi havas nomon similan al Mikaela Mikael, Miĥal, Michel aŭ similian?

Mi ne scias, ĉu eble Vi jam scias ke tiu nomo fakte estas demando, hebrelingva demandofrazo: Mi-ka-el? Kiu estas kiel Dio?

Kaj jen mia unua respondo al tiu demandofrazo: Neniu! Neniu estas kiel Dio!

En la evangelio laŭ Mateo, kiun mi ĵus legis, ni aŭdis la demandon de la disĉiploj. Tipaj homoj ili demandas:

Kiu do estas la plej granda ...?

Ja, tiel funkcias nia mondo!

Antaŭ ĉirkaŭ dudek jaroj la Ĉeĥa Televido elektis la 100 plej gravajn ĉeĥojn de la tuta historio. Je la unua rango



Pastoro W. Rohloff dum diservo en Zöblitz.

estis la germania imperiestro Karolo IV, kiu konstruis la faman Karolan ponton en Prago kaj fondis la universitaton en Prago. Je la dua loko estis Tomáš Masaryk, la unua prezidanto de la sendependiĝinta Ĉeĥoslovakio post unua

Mateo 18,1-6.10

1 En tiu horo la disĉiploj venis al Jesuo, dirante: Kiu do estas la plej granda en la regno de la ĉielo? 2 Kaj alvokinte al si infanon, li starigis ĝin meze de ili, 3 kaj diris: Vere mi diras al vi: Se vi ne turniĝos kaj ne fariĝos kiel infanoj, vi neniel eniros en la regnon de la ĉielo. 4 Kiu do humiligos sin, kiel ĉi tiu infano, tiu estas la plej granda en la regno de la ĉielo. 5 Kaj kiu akceptos unu tian infanon en mia nomo, tiu akceptas min; 6 sed kiu igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus subakvigita en la profundon de la maro.

10 Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj; ĉar mi diras al vi, ke iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo.

mondmilito. Je la tria loko, tiun nomon Vi jam hodiaŭ aŭdis, estis Václav Havel, la fama aŭtoro, politika malliberulo kaj la unua prezidanto de la Ĉeĥa Respubliko post la komunismo. Grandaj homoj! Mi ĉi tiun liston nur bedaŭras, ke la unua ino en tiu listo estas nur je la 10a pozicio: Božena Němcová.

Por tiuj, kiuj eble ne konas ŝin: Božena Němcová estis aŭtorino el la 19a jarcento, kaj oni povas diri, ke ŝi kvazaŭ fondis la ĉeĥan lingvon kiel literaturan lingvon. Mi ne scias, ĉu ekzistas en la libroservo ekzemple la libro Babička, do Avino de ŝi aŭ ŝia fabelaro.

Sed, ho ve, se mi rigardas aŭ serĉas la unuajn plej grandajn homojn el mia lando, do el Germanio, mia reta serĉo estas iomete … embarasa:

Do, la unua loko, en ordo!, estas Albert Einstein, fama fizikisto; poste je la dua loko jam ekaperas manekeno Claŭdia Schiffer, la tria loko aŭtopiloto Michael Schumacher, poste la modkreinto Karl Lagerfeld, poste la aktoro Horst Tappert, alias Kommissar Derrick kaj ie ajn jam, ankaŭ ie aperas iuj sinjoroj Goethe aŭ Luther.

Kiu do estas la plej granda ...?

Tion demandas mi, kune kun la disĉiploj, Jesuon, esperante ricevi la respondon de li: Vi estas la plej granda!

Sed tiurilate la disĉiploj eraras. Laŭ Jesuo jam la demando estas erara: Nek potencaj ŝtatestroj, nek saĝaj filozofoj, nek sukcesaj sciencistoj estas la plej grandaj, sed tiu (versiklo 4), ...

> *Kiu do humiligos sin, kiel ĉi tiu infano, tiu estas la plej granda en la regno de la ĉielo*.

Kaj mi ja eĉ ne jam menciis tiun unuan ŝokiĝon: Jesuo diris antaŭe:

> *Vere mi diras al vi: Se vi ne turniĝos kaj ne fariĝos kiel infanoj, vi* ***neniel*** *eniros en la regnon de la ĉielo.*

Infanoj, en la greka teksto de la Nova Testamento laŭvorte infanetoj, παιδίον. Infaneto estas senpotenca, dependa. Infaneto bezonas la helpon de gepatroj.

Sed Jesuo postulas: Fariĝu kiel infanoj: fariĝu humilaj, rezignu pri potenco, je orgojlo kaj prudento, estu dependaj, dependaj de ... Dio, via patro.

Ĉu Vi rimarkis? La mezurskalo de Jesuo **ne** estas **nia**. Tio vere igu nin pripensemaj!

Kaj poste Jesuo parolas pri nia granda respondeco por aliaj, por senpotencaj, por malgrandaj homoj (versiklo 6):

> *... kiu igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus subakvigita en la profundon de la maro.*

Tio estas **bildo**. Ne forgesu tion, alegorio aŭ provoka komparo! Kaj ni iom pricerbumu tiun bildon! Tiel granda estas, laŭ Jesuo, nia respondeco por homoj senpotencaj, bezonantaj helpon, dependaj en iu senco.

Kaj Jesuo finas per la vortoj:

> *Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj; ĉar mi diras al vi, ke iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo.*

Tion aŭskultante mi demandas min: Kiel mi povus almenaŭ parte kontentigi tiujn postulojn? Tio ja ne eblas! Estas tiom da homoj, kiuj bezonas helpon. Mi ja tute ne scias, kie mi komencu!

Konsileto: La **komenco** estas la plej grava sed ankaŭ la plej facila. Ekzemple: Pripensu, kiel Vi au la homoj en Via familio aŭ lando parolas pri homoj. Dum diskutoj, en la reto aŭ aliloke mi tre ofte rimarkas, kiel malafable, malestime, sename oni parolas pri homoj. Kiel ekzemple en Via lando aŭ familio oni parolas pri fremduloj, alireligianoj, rifuĝintoj, azilpetantoj, pri homoj, kies seksa orientiĝo ne kongruas kun tiu de la plimulto?...

Ni respondecas pri la homoj malgrandaj, malgravaj, senpotencaj, malfortaj, pri ĉiuj, kiuj vivas kun ni, aŭ pri kiuj ni parolas.

> *Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj; ĉar mi diras al vi, ke iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo.*

Fina ideo: La vorto anĝelo fakte nenion alian signifas ol sendito, ambasadoro, mesaĝisto. Ne la sendito gravas, sed la mesaĝo. Kaj tiel la Biblio uzas la vorton anĝelo ne nur por ĉielaj estaĵoj, sed ankaŭ por homoj.

Tian anĝelon mi fine volas prezenti al vi: Přemysl Pitter. Li estis naskita en la jaro 1895 en Prago. Li, estante juna viro, estis konvinkita ateisto kaj bonvivanto. Baldaŭ li bankrotigis la heredaĵon de siaj gepatroj, presejon. Mem li estis ulo ruina. Kaj li kvazaŭ fuĝis libervole en la unuan mondmiliton, por tiel oferi kaj perdi sian propran vivon por la imperiestro, popolo kaj patrujo.

Sed dum milito, kaj tion li poste konfesis, li ekkomprenis:

> *"Mi vivo ne apartenas al mi, sed al dio. Kaj mia tasko estas savi dronantojn."*

Pitter fariĝis kristano, studis teologion, kaj fondis en Prago Milíč-domon, domon, kie oni prizorgis – ĝis hodiaŭ ankoraŭ ekzistas – kaj helpis infanojn el la plej subaj tavoloj sociaj. Kiam ekde la jaro 1933 judoj, socialdemokratoj kaj socialistoj devis fuĝi el Germanio, li akceptis ilin en sian domon kaj helpis.

Kiam post la okupado de la sudetaj, do apudlimaj, tiutempe grandparte germanlingvaj regionoj de Ĉeĥoslovakio, el tiuj regionoj fuĝis judoj kaj ĉeĥoj, li ilin akceptis kaj helpis.

Post la okupado (fare de Germanio) de tuta Ĉeĥio, li kvankam severe malpermesite de la nazioj, kaŝis judajn infanojn je altega, persona risko je sia vivo.

La nazia sekreta polico Gestapo lin arestis tial. Gestapa oficisto lin pridemandis kriante al li: "*Kial Vi kaŝas judajn infanojn en Via orfanujo?*" Pitter respondis:

> *"Aus menschlicher Sicht verstehen Sie das sicher."*
>
> *"Z lidského hlediska mi jistě rozumíte."*

“El homa perspektivo Vi certe komprenas.”

Post tiu frazo okazis miraklo. La oficisto, nazio, ordonis al li foriri el la policejo kaj Pitter kune kun siaj multaj dekoj de judaj infanoj postvivis la militon. Post la milito oni komisiis al li kelkajn apudpragajn kastelojn, por ke li tie prizorgu judajn infanojn el la koncentrejo Terezín [ge: Theresienstadt]. Sed li ankaŭ prizorgis sengepatrajn orfajn germanlingvajn infanojn el Ĉeĥio.

Sed tiel li arigis kontraŭ si novajn, potencajn malamikojn, tiel, ke li en la jaro 1955 devis fuĝi tra okcidenta Berlino al okcidenta Germanio. Kaj de tie li venis al Svislando. Tamen dum sia tuta vivo li sin engaĝis por repaciĝo inter ĉeĥoj kaj germanoj.

El homa perspektivo Vi certe komprenas.

Kvankam li bone sentis tiun malamikan atmosferon kontraŭ si, li firme tenis sian bazan konvinkon: *“La infanoj pri nenio kulpas!”* Tiel li savis pli ol 810 judajn kaj germanajn infanoj for de la morto.

Jesuo diras:

kiu akceptos unu tian infanon en mia nomo, tiu akceptas min;

kaj li ankaŭ diras:

Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj; ĉar mi diras al vi, ke iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo.

Mi komence rakontis al Vi, ke en la nomo Mikaela, Miĥael kaj tiel plu ja estas demando, la demando: “Kiu estas kiel Dio?”

Nun mi devas korekti mian unuan respondon: Ni certe ne estas Dio. Sed kiu ne ignoras la suferon kaj mizeron de aliaj homoj, kiu helpas kaj ne agitas kontraŭ homoj, malgrandaj, senpotencaj k.t.p., tiu sekvas Jesuon kaj agas kiel Dio.

Tia homo estas anĝelo de Dio, sendito de Dio sur tiu ĉi tero.

Kiu do estas kiel Dio?

Jesuo petas nin:

Imitu Dion; *fariĝu homo*!

Kaj la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardu viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo.

Amen.

Post la prediko – Adoru 506

La prediko aŭdeblas ĉe:
https://tinyurl.com/4cf25jwv



De maldekstre:
Pastoro Vladimir el Ĉeĥio,
Pastorino Miora el Malagasio
Pastoro Wolfram el Germanio

Ekumena diservo kadre de UK en Brno

La diservo, organizita de KELI, okazis dimanĉe 27. 7. 2025 de 14-a horo en Ruĝa preĝejo sur la placo de Jan Amos Komenský

Raportas Pavel Polnický, CZ

Partoprenantojn bonvenigis Pavel Polnický kaj prezentis unuopajn celebrantojn.

Diservon kun Sankta Manĝo gvidis Vladimir Václav Karbusický, pastoro de Ĉeĥoslovaka husana eklezio el Prago, predikis Wolfram Rohloff, pastoro de Evangelia luterana eklezio de Saksio, Germanio, kuncelebris pastorino Miora Raveloharison el Malagasio kaj legantojn de bibliaj tekstoj, IKUEanojn Pavel Petrik, Slovakio kaj Georg Rosenbaum, Germanio. Orgenludis Matěj Přikryl, juna loka orgenisto. Partoprenis proksimume 40 personoj. Monkolekto estis sendita al Stichting Zienderogen, nederlanda fondaĵo, helpanta al nevidantoj. Dum anoncoj estis ĉiuj invititaj al komuna kunveno de IKUE kaj KELI, al Bibliaj tagoj kaj venonta KELI kongreso.

Post la fino ni komune foriris al apuda paroĥa domo, kie ni povis trankvile trinki kafon aŭ teon kaj interkonatiĝi kaj babili.

Ruĝa preĝejo – Jan Amos Komenský

Tuj post la eldono de Dekreto de religia toleremo (1781) estis fondita komunumo de germanaj luteranoj kaj lokaj kalvinanoj, kiuj komune rekonstruis sian preĝejon en strato Husova 10. La eklezia komunumo pligrandiĝis kaj ili decidis konstrui grandan preĝejon en nordgermana gotika stilo. Estis uzitaj ruĝaj brikoj kaj pro tio estas konata kiel Ruĝa preĝejo. Laŭ la protestanta tradicio estas interno severa kaj simpla. Post la establo de Ĉeĥoslovakio kaj forpelo de multaj germanaj loĝantoj el Brno, komunumo fariĝis parto de Ĉeĥfrata eklezio evangelia, al kiu apartenas gis nun.

Komuna kunveno de IKUE kaj KELI

Ĝi okazis ĵaŭde je la 12-a horo en kongreseja salono de Oto Ginz. Kiel kutime dum UK-oj, homoj libervole venas kaj foriras. proksimume partoprenis 30 – 40 personoj.

La traktado bedaŭrinde ne estis tro ekumena. Unue parolis prezidantino de IKUE, Marija Beloševič kaj tuj akre atakis nian ligon, ĉefe pro la du ekumenaj diservoj dum la nuna UK. Ŝi estis maltrankvila kaj ofte parolis laŭte. Mi versajne senefike volis klarigi tiun situacion kaj multaj homoj senrevigitaj foriris....

Kongresaj novajoj

- venonta UK okazos en Graz, Aŭstrio.
- en novan estraron de UEA estis elektita pastorino Miora el Malagasio, kiu zorgos pri Universitata kaj Virina agadoj kaj Afriko.



Marija Beloševič kaj Pavel Polnický

Li renversas la miton pri perforto en la nomo de religio

Pri la teologo William T. Cavanaugh

Patrik Hagman, SE

Kio precize estas religio? Teologo William T Cavanaugh fokusiĝas pli al la funkcio de religio prefere ol al ĝia enhavo – kaj kredas, ke naciismo kaj konsumkulturo funkcias kiel idolkulto en nia tempo.

La jena artikolo estas traduko de artikolo en la sveda gazeto *Dagens nyheter* (DN) la 13an de aŭgusto 2025. La rezencisto, Patrik Hagman, estas finna teologo. Kun afabla permesoj de la verkisto kaj la gazeto, tradukis Bengt Åradsson.

www.dn.se/kultur/patrik-hagman-han-vander-pa-myten-om-vald-i-religionens-namn/

Ĉu gravas, kion homoj kredas? En la moderna mondo, ekzistas malsamaj respondoj al tiu demando. Kompreneble, iuj respondas ne, ke ĉiu povas esti benita laŭ sia propra maniero. Tiuj, kiuj kritikas religion, respondas jes, religia kredo damaĝas kaj la individuon kaj la socion.

Hodiaŭ, eble tria respondo estas plej ofta. Jes, la kredo ludas certan rolon en la propra vivo de la individuo. Kredo povas helpi en la lukto kun la vivdemandoj, kiujn neniu el ni povas eviti. Ĝi eble povas funkcii kiel motiviga faktoro en moralaj aferoj. Krom tio, kaj sendube en politiko, ni devus resti ĉe pli palpeblaj aferoj kiel faktoj kaj potenco.

Malmultaj en nia tempo argumentis kun pli granda klareco kaj persisto ol la politika teologo William T Cavanaugh, ke nia kredo ludas decidan rolon en la mondo. Li hodiaŭ estas profesoro pri katolika teologio ĉe DePaul en Ĉikago kaj famiĝis en la akademia mondo kiam, en serio de artikoloj ĉirkaŭ la jarmilŝanĝo kaj poste en la libro THE MYTH OF RELIGIOUS VIOLENCE [La mito de religia perforto], li pridubis unu el la fundamentaj kredoj de laika socio: ke religio kondukas al perforto se ĝi estas permesata influi [la socion] ekster la privata vivo de la individuo. La tezo estas tiel profunde enradikiĝita en nia mondkoncepto, ke ĝi ŝajnas memevidenta. Ĉu ne estas tio, kion ni nun vidas okazi denove en Usono kaj en Israelo/Palestino?

Cavanaugh atakas la tezon laŭ du manieroj. La unua objeto estas historia: li pridubas la originan rakonton pri kiel Eŭropo preskaŭ estis disŝirita de religiaj militoj ĝis la Klerismo kaj laikaj ŝtatoj kreis ordon. La tiel nomataj religiaj militoj estis batalitaj egale multe inter armeoj de la sama religio, li atentigas. Rektaj aliancoj inter katolikoj kaj protestantoj ankaŭ okazis, kiel kiam

Kardinalo Richelieu financis la militajn aventurojn de [la sveda reĝo] Gustavo II Adolfo.

Kontraŭe, li renversas la rakonton kaj montras kiel ĉi tiuj militoj – kaj tiom da militoj post ili – pli ĝuste aperis kiel maniero por nacio-ŝtatoj establi sin kaj plifortigi sian unuecon, per forpuŝo kaj anstataŭigo de religiaj lojalecoj. Kaj jen ni venas al la dua argumentado.

> ***... li pridubas unu el la fundamentaj kredoj de laika socio: ke religio kondukas al perforto se ĝi estas permesata influi ekster la privata vivo de la individuo.***

Ĉar kio vere estas religio? La koncepto estas fifame malfacile difinebla, kaj Cavanaugh aliĝas al tiuj esploristoj, kiuj preferas difinojn, kiuj fokusiĝas al la *funkcio* de religioj anstataŭ al la *kred-enhavo* de la religioj. Estas sufiĉe bone establite, ke naciismo havas fortajn religiajn trajtojn: la nacio estas imagita komunumo, kiu estas konservata per mitoj kaj ritoj. Tial estas neeble limigi fenomenon kiel religio kaj kulpigi ĝin pri perforto.

En sia plej nova libro THE USES OF IDOLATRY [La uzoj de idolismo], li ekzamenas naciismon kaj la alian grandan superregan ideologion de nia tempo, la kapitalismon, kiel formojn de idolkulto. Kapitalismo ankaŭ havas religiajn trajtojn, kun sia kredo je la kaŝita mano de la merkato kaj la strangaj ecoj, kiujn ĝi atribuas al produktoj kaj fabrikmarkoj. Sed la diferencoj ankaŭ estas interesaj.

Cavanaugh montras, kiel naciismo plejparte kreskas el kristanismo kaj konservas multajn el ĝiaj trajtoj. Ĉi tio videblas en la simbolismo, lingvo kaj ritoj, sed ankaŭ en ia morala sinteno. Naciismo kreskigas ion similan al kristana amo al la proksimulo. La celo estas organizi sian vivon surbaze de kredo je io pli granda ol si mem.

Kapitalismo, aŭ pli precize konsumkulturo, pli similas al popolaj religiaj esprimoj – amuletoj, magiaj formuloj kaj miraklaj kuraciloj – kiuj ĉiam ekzistis paralele kun oficiala kristanismo.

Konsumado estas ia magio, kiun ni uzas por malhelpi maljuniĝon per kremoj aŭ piloloj, aŭ por pliigi nian allogon per aĉeto de vestaĵoj aŭ aŭtoj sen tegmento. Kontraste al instituciaj religioj (aŭ naciismo), ne ekzistas unueca sistemo, kiu diras kio estas ĝusta aŭ dezirinda. Do dum naciismo multe plifortigas aŭtoritaton kaj konkordon en socio, konsumismo kontraŭagas ĉi tiujn. Finfine, la konsumisto adoras nur sin mem.

La termino *"mega-preĝejo"* [megachurch] originas el Usono, sed la plej granda preĝejo de la mondo estas la *Plena Evangelio* [Full Gospel Church] de Yoido, situanta en Sud-Koreio.

Interpreti ion kiel religion (kiel iuj faras pri, ekzemple, futbalo) ne estas io nova. Do, kio efektive estas klarigita kiam Cavanaugh uzas la malnovtestamentan terminon idolkulto por priskribi tiajn fenomenojn?

Ĉi tio ne estas retorika batalfrapo. La baza tezo de Cavanaugh estas, ke ĉiuj

homoj ion adoradas kaj ĉiuj faras tion malbone. Ĉi tio ankaŭ validas por kristanoj. Ekzistas tendenco miksi la kristanan kredon kun trajtoj de idolkulto – kiel en la usona naciisma kristana dekstro, aŭ en la same usona mega-eklezia fenomeno, kie benoj tendencas esti mezurataj per dolaroj. Detruaj esprimoj de kristana kredo ofte estas tiaj miksaĵoj.

Por Cavanaugh, idolkulto temas pri tio, ke ni restas ĉe tiuj sistemoj, kiujn ni homoj kreis, eĉ kiam ili turnas sin kontraŭ ni kaj komencas damaĝi nin.

Naciismo, ekzemple, atendas, ke ni estu pretaj morti kaj mortigi por la nacio. Konsumismo pli bone kaŝas siajn viktimojn, sed ĉiuj scias, ke ili troviĝas en fabrikoj en malaltkostaj landoj kaj inter tiuj, kiujn trafas la mediaj katastrofoj, kiuj plej ofte sekvas ĝiajn paŝojn. Kaj ne forgesu tiujn viktimojn, kiuj formas sian bagatelan vivcelon "iĝi riĉa".

Ke naciismo kaj konsumado fariĝas niaj falsaj dioj videblas ankaŭ en tio, ke ni por ili pretas oferi ĉion alian, je kio ni kredas. Nur naciismo, kiel ideo, povas klarigi, kiel eblas, ke 140 milionoj da rusoj ne haltigas militon, kiu pelas tiom da proksimuloj kaj amatoj al la morto. Sed la abstrakta ideo "Rusio" superas homajn vivojn.

La dio de konsumado ludas la saman rolon. Nuntempe, ekzemple, ni normaligas, ke niaj infanoj estas rekrutitaj por esti murdintoj, ĉar ni ne povas imagi interrompi la komercajn agadojn de la *Gigantoj de Tekniko* [Big Tech]. Kiel socio, ni taksas la liberecon de la merkato pli alte ol preskaŭ ĉion alian. Ni vidas la samon en la sveda lerneja politiko.

Ŝajnas kvazaŭ ke ni nun devas elekti la malpli gravan el ĉi tiuj du idoloj, kaj

William T. Cavanaugh (naskita en 1962) estas usona katolika teologo konata pro sia laboro pri politika teologio kaj kristana etiko.

Cavanaugh ricevis sian bakalaŭron pri teologio de la Universitato de Notre Dame en 1984, kaj magistron pri artoj de la Universitato de Kembriĝo en 1987. Li poste studis ĉe Universitato Duke, kie li doktoriĝis en 1996. Liaj specialiĝaj fakoj estas politika teologio, ekonomia etiko kaj eklezioscienco.

En 2010, li estis nomumita al Universitato DePaul, kie li nuntempe estas profesoro pri katolikaj studoj kaj direktoro de la Centro por Monda Katolikismo kaj Interkultura Teologio.

Li publikigis multajn librojn kaj artikolojn, el kiuj kelkaj estis tradukitaj en plurajn lingvojn.

El Vikipedio, angla versio



W. T. Cavanaugh. /Far Renovatio: The Journal of Zaytuna College, CC BY 3.0, https://commons.wikimedia.org/

efektive estas malĝoja elekto tiun alfronti.

En la post-post-moderna pensmaniero, estas populare svingiĝi kun la ideo, ke la socio bezonas koherajn rakontojn por funkcii, kaj ke ne gravas ĉu ĉi tiuj rakontoj estas veraj aŭ ne. Ĉu gravas se la grandaj tagoj de la pasinteco vere ne estis tiel grandaj, se tio ideo tamen ardigas la korojn de la homoj?

Apenaŭ surprizas, ke Cavanaugh, kiel teologo, montras trian alternativon: anstataŭe provu adori ion veran.

Pripensu se ĝuste la granda idolo de nia tempo estas tiu mensogo – ke ne gravas kion ni adoras? Kaj vere nur per klopodo konstrui niajn vivojn sur vero ni povas atingi pacon kaj signifon?

Tiukaze, tio ludus sufiĉe gravan rolon.

ଔ

Biblia vorto kaj mia penso

Karaj, nu, en la lastaj tempoj mi apenaŭ povas legi novaĵojn aŭ spekti televidon, sen ke mi sentas min ĝismorte deprimita. Al la malbonaj raportoj sekvas eĉ pli malbonaj kaj oni preskaŭ ne povas kredi ilin. Kio okazas en la mondo? Ĉu la malbono ĉiam estis tiel forta, kiel nun? En la Biblio oni ofte povas legi pri malbono, aŭ pri malbonuloj, do mi supozas, ke la temo ne estas tute nova. Tamen samtempe la Dia vorto donas al ni la certecon, ke la malbono ne venkos, kaj ke Dio certe punos la malbonulojn. Ni (kaj mi) legu do atente, kaj ne perdu la fidon al tio, kion Dio promesis fari.

Jerald Veit

***

Ne venkiĝu de malbono, sed venku malbonon per bono. (Romanoj 12:21)

Sed liberigu nin de la malbono. (Mateo 6:13b)

La vizaĝo de la Eternulo estas kontraŭ tiuj, kiuj faras malbonon, por ekstermi de la tero la memoron pri ili. (Psalmaro 34:16)

La Eternulo vin gardos de ĉia malbono, Li gardos vian animon. (Psalmaro 121:7)

La dekunua ordono: “Ne estu indiferentaj!”

75-a jariĝo de la liberigo de Aŭŝvico (Auschwitz) 27 januaro 2020

Parolado de la pola ĵurnalisto Marian Turski, PL
Elgermanigis Wolfgang Guenther, DE

Republikigo

Tiu ĉi artikolo estis jam publikigita en Dia Regno 1/2020 pro la tiama 75-jariĝo. Ĉi-jare okazis la 80an datrevenon de la liberigo de Aŭsviĉo kaj la mesaĝo estas same valida. /Red

Tre estimataj gekunvenintoj, geamikoj, mi estas unu el tiuj, kiuj ankoraŭ vivas kaj unu el la malmultaj, kiuj ĝis preskaŭ la lasta momento antaŭ la liberigo estis en ĉi tiu loko. Je la 18a januaro komenciĝis mia tiel nomata evakuado el la koncentrejo Aŭŝvico, kiu post ses kaj duona tagoj montriĝis por pli ol la duono de miaj kunkaptitoj kiel mortomarŝo. Ni estis kolono de 600 personoj.

Tre verŝajne mi ne ĝisvivos la venontan jariĝon. Tiel estas la homaj leĝoj. Pro tio pardonu min, ke en tio, kion mi diros, estas iom da emociado. Kion mi diros, mi antaŭ ĉio volas diri al mia filino kaj al mia nepino, kiun mi dankas, ke ŝi ĉeestas ĉi tie, kaj al mia nepo. Mi adresas la samaĝulojn de mia filino, de miaj genepoj, do la novan generacion, aparte la plej junan.

Kiam ekestis la milito, mi estis adoleskanto. Mia patro estis soldato kaj estis suferinta gravan pafvundon de la pulmo. Tio estis dramo por nia familio. Mia patrino devenis el la pola-litova-belorusa limregiono. Tie estis trapasintaj la armeoj, tien kaj reen, ili marodis, prirabis, perfortis, forbruligis vilaĝojn, por ke ne restu io por tiuj, kiuj venis post ili. Pro tio oni povas diri, ke mi aŭtentike sciis, kion signifas milito. Tamen ŝajnis al mi, kvankam estis pasintaj nur 20, 25 jaroj, ke ĝi estis tiom fora kiel la polaj insurekcioj en la 19-a jarcento aŭ la franca revolucio.

Kiam mi hodiaŭ renkontas gejunulojn, mi konsciiĝas, ke ili post 75 jaroj estas iom teditaj de ĉi temo: kaj de la milito kaj de la holokaŭsto, de la ŝoaho, de la genocido. Mi komprenas ilin. Pro tio mi promesas al vi, junaj homoj, ke mi ne parolos pri mia mizero. Mi ne rakontos al vi pri miaj travivaĵoj, pri miaj du mortomarŝoj, prí tio, kiel mi travivis la finon de la milito, kiam mi pezis 32 kilogramojn, rande de la plenelĉerpiĝo kaj de la vivo. Mi ne rakontos pri tio, kio estis la plej malbona, tio estas pri la tragedio esti apartigata de miaj plejproksimuloj, kiam vi post la selektado antaŭsentas, kio ilin atendas. Ne, pri tio mi ne parolos. Mi volas paroli kun la generacio de mia filino kaj la generacio de miaj genepoj, pri ili mem.

Mi vidas, ke inter vi sidas la aŭstra federacia prezidento Alexander Van der Bellen. Ĉu vi memoras, Sinjoro Prezidento, kiam vi gastigis min kaj la prezidion de la Internacia Komitato de Aŭŝvico kaj ni parolis pri la tiamaj tempoj? Iumomente vi uzis la formulon “Aŭŝvico ne falis el la

ĉielo”. Oni povus diri, ke ĝi estis, kiel la poloj diras, memkomprenebla memkompreneblaĵo.

Klare, ĝi ne falis el la ĉielo. Ŝajne povus esti banala konstato, sed ĝi estas profunda kaj por la kompreno tre grava mensa koncizaĵo. Ni dum momento reiriu en niaj pensoj, nia imagopovo, en la fruajn 1930ajn jarojn al Berlino. Ni troviĝas preskaŭ en la urbocentro. La kvartalo nomiĝas Bavara Kvartalo. Tri stacioj for de la Kurfürstendamm kaj de la Zoologia Ĝardeno. Tie, kie hodiaŭ estas metroa stacio, situas parko. Kaj iun tagon en la fruaj 1930-jaroj aperas sur la benkoj ŝildo: “Por judoj la sidado sur ĉi benkoj estas malpermesata”. Oni povus diri: Tio estas malkonvena, nejusta, ne oŭkej, sed finfine ja estas proksime tiom da benkoj, oni ja povas sidigi sin aliloke, ne estas malfeliĉo.

Estis kvartalo, en kiu loĝis reprezentantoj de la germana intelekta elito juddevena, ankaŭ Albert Einstein, la nobelpremiito Nelly Sachs kaj la industriulo, politikisto kaj ministro pri eksteraj rilatoj, Walter Rathenau. Poste aperis en la naĝejo la ŝildo: “Por judoj la eniro al la naĝejo estas malpermesata”. Oni denove povus diri: tio ne estas agrabla, sed Berlino havas tiom da lokoj, je kiuj oni povas sin bani, tiom da lagoj, kanaloj, preskaŭ kiel en Venecio, oni do povas iri al alia loko.

Samtempe aperas ie la ŝildo “Por judoj la membreco en germanaj kantkluboj estas malpermesata”. Nu, kio do? Se ili volas kanti aŭ muziki, ili do renkontiĝu apartigite kaj ili certe povos kanti. Tuj poste aperas surskribo kaj ordono: “Por judaj nearjaj infanoj la ludado kun germanaj, arjaj infanoj estas malpermesata”. Ili ludos solaj. Kaj post



Marian Turski parolas ĉe la 75-a datreveno de la liberigo de Aŭŝvico, 2020.

Fotis Wojciech Grabowski - www.auschwitz.org, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=87194957.

tio aperas ŝildo: “Al judoj oni vendas panon nur post la dek sepa horo”. Tio ja estas malhelpaĵo, ĉar tiam la elekteblo estas malpli granda, sed finfine oni ja povas iri por aĉeti ankaŭ post la kvina posttagmeze.

Atenton, atenton, ni komenciĝas alkutimiĝi je la penso, ke oni povas ekskludi iun, stigmatizi iun, fremdigi iun. Kaj tiel la homoj lante, pli kaj pli, tagon post tago, intimiĝas pri tio – kaj la viktimoj kaj la faruloj kaj atestuloj, kaj tiuj, kiujn ni nomas apudstarantoj alkutimiĝas je la penso kaj

ideo, ke ĉi minoritato, el kiu devenis Einstein, Nelly Sachs, Heinrich Heine kaj la Mendelsohnoj estas io alia, ke ĝi povas esti elpelata el la socio, ke ĝi konsistas el fremdaj homoj, ke tiuj estas homoj, kiuj disvastigas mikrobojn, epidemiojn. Tio vere estas terura, danĝera. Tio estas la komenciĝo de tio, kio povas tuj sekvi.

La tiamaj potenculoj unuflanke faris ruzan politikon, ĉar ili ekz. plenumis la postulojn de la laboristoj. La 1a de majo neniam antaŭe estis festita en Germanio, sed ili ja faras tion, jes. Je la senlabora tago ili enkondukas "Forto per ĝojo". Elemento de laborista feriado, do. Ili kapablas superi la senlaborecon, ili povas ludi per la nacia digno: "Germanoj, stariĝu el la malgloro de Versailles. Regajnu vian fieron". Kaj samtempe la potenculoj ekkonas, ke la homoj pli kaj pli estas kaptataj de sensentemo, de indiferenteco. Ili ĉesas reagi al la malbono. Kaj jen la potenculoj povas permesi al si pluakceli la proceson de la malbono.

Poste la alio rapidege sekvas: la malpermeso dungi judojn, la malpermeso vojaĝi eksterlanden. Kaj post tio rapide sekvas la deportado en getojn. Al Riga, Kaŭno, en mian geton, la geton de Lodz Litzmanstadt. De kie la plej multaj estas transportataj al Kulmhof am Ner, kie ili estas mortigitaj en

Marian Turski (26a de junio 1926 – 18a de februaro 2025) estis pola-juda historiisto, ĵurnalisto kaj holokaŭsto-transvivanto. Ekde 1942 li estis en la Łódź-geto. Lia patro kaj frato estis murditaj post selektado. De tie, en aŭgusto 1944, li estis deportita al la germana nazia koncentrejo ĉe Aŭŝvico-Birkenau. Li postvivis la devigan evakuadon de la koncentrejo, la Mortomarŝon de januaro 1945, de Aŭŝvico al Wodzisław Śląski, de kie li estis transportita al Buchenwald. Post la fino de la Dua Mondmilito, li ekloĝis en Varsovio.

Ekde 1945, li fariĝis aktivulo de la junulara organizo aligita kun la Pola Laborista Partio. Li poste laboris en la Gazetara Departemento de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio. Ekde 1958, li administris la historian sekcion de la semajna gazeto Polityka. Li estis komunista cenzuristo kaj en 1946 li partoprenis en la falsigo de la referendumo "3 x JES", helpante Stalinon okupi Pollandon.

En marto 1965, dum li estis registara stipendiulo al Usono, li partoprenis en la marŝo de Martin Luther King kontraŭ rasa apartigo en la Suda Usono: de Selma ĝis Montgomery.

Turski estis vicprezidanto de la Juda Historia Instituto en Pollando, membro de la estraro de la Asocio de Judoj, Militveteranoj kaj Aliaj Viktimoj de la Dua Mondmilito, membro de la Internacia Konsilio de Aŭŝvico kaj Konsilio de la asocio, kiu administras la Domon de la Wannsee-Konferenco. Li ankaŭ estis honora komitatano de la Juda Motivo-Asocio kaj la Internacia Filmfestivalo de Judaj Motivoj, kiun organizas ĉi tiu asocio. Krome, li ankaŭ prezidis la Konsilion de la POLIN-Muzeo pri la Historio de Polaj Judoj (ekde la 25a de marto 2009).

En 2019, okaze de la Internacia Tago de Memoro pri la Holokaŭsto, li estis invitata al Unuiĝintaj Nacioj por paroli dum la ceremonio la 28an de januaro 2019, en la ĉambro de la Ĝenerala Asembleo.

El Vikipedio (angla versio)

Foto: Auschwitz I (22 May 2010).jpg:, CC BY 2.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=167717239

kamionoj per elĵetgasoj, kaj la resto venas al Aŭŝvico, kie ili estas murditaj en modernaj gaskameroj per ciklono B. Kaj jen pruviĝas vera, kion diris la aŭstra federacia prezidento: "Aŭŝvico ne falis el la ĉielo". Aŭŝvico trotetis, faris etajn paŝojn, alproksimiĝis ĝis kiam okazis, kio okazis, ĉi tie.

Mia filino, mia nepino kaj vi, la samaĝuloj de mia filino kaj de mia nepino – eble vi ne konas la nomon de Primo Levi. Primo Levi estis unu el la plej famaj arestitoj de ĉi koncentrejo. Primo Levi iam uzis la jenan formulon: "Ĝi okazis, kaj sekve ĝi denove povas okazi". Tio signifas, ke ĝi povas okazi ĉie en la mondo.

Mi nur volas dividi kun vi unu el miaj personaj spertoj: 1965 mi estis stipendie en Usono, en Ameriko, kaj tiam estis la kulmino de la lukto por homaj rajtoj, civitanaj rajtoj, por rajtoj de la afroamerika loĝantaro. Estis honoro por mi partopreni en la Selma-Montgomery-marŝo kun Martin Luther King.

Kaj tiam la homoj, kiam ili eksciis, ke mi estis en Aŭŝvico, demandis min: "Kion vi pensas, ĉu tiu aĵo estis ebla nur en Germanio? Aŭ ĉu ĝi povas okazi ankaŭ aliloke?" Kaj mi diris al ili: "Tio povas okazi ankaŭ ĉe vi. Se estas lezataj civitanaj rajtoj, se ne estas respektataj la rajtoj de minoritatoj, se oni abolas ilin. Se oni distordas la leĝon tiel, kiel okazis en Selma, tiam ĝi povas okazi". "Kion oni povas fari kontraŭ tio?" "Vi mem povas fari tion", mi diris al ili. "Se vi kapablas defendi vian konstitucion, viajn rajtojn, vian demokratian ordon, protektante la rajtojn de minoritatoj – tiam vi povas venki ĝin".

Ni en Eŭropo plejparte devenas de la juda-krista tradicio. Kaj kredemaj kaj nekredemaj homoj rigardas la dek ordonojn sia civiliza kanono. Mia amiko, la prezidento de la Internacia Aŭŝvico Komitato, Roman Kent, kiu antaŭ kvin jaroj ĉi-loke faris paroladon okaze de la pasinta aranĝo, ne povis veni hodiaŭ. Li elpensis dekunuan ordonon, kiu prezentas la spertadon de la ŝoaho, de la holokaŭsto, de la horora epoko de malestimo.

Ĝi tekstas: *Vi ne estu indiferentaj!*

Kaj tion mi volonte dirus al mia filino, tion mi volas diri al miaj genepoj. Al la samaĝuloj de mia filino, de miaj genepoj, kie ajn ili vivas: en Polio, en Israelo, en Ameriko, Orienteŭropo, Okcidenteŭropo. Tio ege gravas.

Ne estu indiferentaj, kiam vi vidas historiajn mensogojn!

Ne estu indiferentaj, se vi vidas, ke la pasinteco estas mistraktata por aktualaj politikaj celoj!

Ne estu indiferentaj, se iu minoritato estas diskriminaciata! La esenco de la demokratio konsistas en tio, ke la majoritato regas kaj la minoritatoj devas esti protektataj.

Ne estu indiferentaj, se iu registaro rompas jam ekzistantajn, kutimajn sociajn kontraktojn! Estu lojala al la ordono. Al la dekunua ordono:

Ne estu indiferentaj!

Ĉar se vi estos indiferentaj, de unu momento al alia, iu Aŭŝvico subite falos el la ĉielo, sur vin kaj sur viajn posteulojn.

Laŭ dokumento de la Internacia Auschwitz Komitee
Stauffenbergstrasse 13/14, 10785 Berlin
www.auschwitz.info

ᘓ

La mortomeritaj pekoj – malnovaj kaj novaj

Prelego dum kongreso en Domaszék 2022

Bazita sur esploro kaj libro de profesoro Stefan Einhorn

Bengt Olof Åradsson, SE

Daŭrigo de DR 2/2025

Malvastperspektiva / spirite miopa

(Miopeco aŭ malvastperspektivo estas kiam homoj estas antaŭjuĝaj, netoleremaj kaj al ili mankas perspektivo)

Laŭ esploro, ĉiu kvina persono estas konsiderata havi tiun ĉi trajton.

Ne-scio povas havi sekvojn en nia agado kontraŭ kaj kiel ni estas, rilate al aliaj en nia socio. (El intervjuo)

Mi malamas homojn, kiuj ne estas toleremaj. (Laurence J Peter).



B. O. Åradsson, en Domaszék

Malvastperspektivo estas kutime komponanto en ksenofobio kaj rasismo. Tamen, malvastperspektivo ne ĉiam temas pri ksenofobio. Spirita miopeco estas larĝa koncepto, kiu inkluzivas *netoleremon*, *antaŭjuĝon* kaj *mankon de perspektivo.*

Netoleremo

Netoleremo signifas malfidon kaj malproksimiĝon de opinioj, agoj, kondutoj aŭ personaj trajtoj kiuj diferencas de mi mem. Mi mem formas la mezurilon surbaze per kiu mi juĝas aliajn.

Homoj kun aliaj trajtoj estas ĝenerale taksitaj kun malpli da valoro. Kelkfoje netoleremo estas tiom akcentita ke homoj kiuj estas ekster la normoj ne estas konsiderataj havi sian ekzistorajto.

Konfesia netoleremo kreas problemojn en multaj landoj kaj foje eĉ havas bazon en leĝo kiu malpermesas precizajn agadojn, kiuj ne estas laŭ la propra grupa kredo aŭ opinio. La propra religio aŭ konfesio estas konsiderata la sola ĝusta.

Antaŭjuĝo

La termino implicas mitojn kaj antaŭjuĝojn pri homoj kaj aliaj fenomenoj; kiaj ili ”vere” estas.

Kategoriigi fenomenojn estas kutimo ĉe homoj kaj eĉ bezonata – t.n. “ŝablona rekono”. Ĝi faciligas rapidan rekonon de agadoj kaj fenomenoj, kiu ŝparas multe da energio kaj peno.

Sed kiam ĉi tiu kategoriigo trosimpligas perceptojn pri grupo de homoj aŭ fenomenoj tiam ĝi fariĝas detrua. Plej ofte tiuj antaŭjuĝoj estas negativaj kaj tiam ili povas konduki al ksenofobio, kiun ni jam diskutis.



Harvard University esploris t.n. subkonsciaj antaŭjuĝoj. La studo baziĝis sur testoj kiamaniere ni kunligas pozitivajn aŭ negativajn konceptojn kun temoj, kie antaŭjuĝo ofte troviĝas, ekzemple etneco, seksa orientiĝo, sekso, aĝo ktp. La testo montris, ke la granda plimulto de homoj havas subkonsciajn antaŭjuĝojn kaj stereotipan pensadon. Eĉ se ni negas ilin, antaŭjuĝoj troviĝas ĉe ni.

Ne temas pri ĉu ni estas aŭ ne estas malvastperspektivaj — temas pri kiomgrade ni estas.

Manko de perspektivo

Manko de perspektivo estas la malkapablo vidi problemon de alia flanko ol la propra. Eĉ se ni konsideras nin mem esti malfermite vidantaj, ni fakte estas enfermitaj en la ideologioj, normoj. kaj valoroj kiuj trapenetras la socion. Ni kreskis kun ili, ili estas perceptitaj kiel evidentaj, kiuj ne povas esti pridubitaj. Kaj samtempe ni kondamnas tiujn societojn kiuj havas aliajn normojn, valorojn kaj ideologiojn. Ni estas blokitaj en tiu rakonto, per kiu nia propra socio estas konstruita.

Danĝera formo de tiu manko de perspektivo estas la malkapablo pensi sendepende. Homo, same kiel simioj kaj aliaj specioj, vivas en hierarkiaj socioj, kie malmultaj decidas por multaj. Ni vidas ĉi tiujn strukturojn ĉie, en politiko, en opinioformado, en la laborejo kaj en la familio. La problemo ekestas kiam ĉi tiuj gvidantoj ankaŭ regas niajn pensojn.

Ĉi tio ne nur okazas en la ekstremo ekzemple en diktaturoj, sed ankaŭ en niaj grupoj kaj socioj. Eĉ se ni havas liberecon de opinio kaj liberecon de gazetaro, ni estas sub influo de unuflanka perspektivo kaj interpretado kaj foje ni eĉ ne konscias pri tio.

Estas facile montri la fingron, sed pli malfacile konstati, ke al ni ĉiuj, sen escepto, mankas perspektivo en certaj terenoj. Homoj ĉiam havas opiniojn, kiuj estas firme enradikiĝintaj en la konscio kaj kiu apenaŭ povas esti movigata de eksteraj impulsoj. Precipe danĝera varianto de perspektivomanko estas fanatikeco. Tiam homoj fariĝas tute nerespondemaj al argumentoj kaj spertoj, kiuj kontraŭas ilian percepton. La konvinko estas senmanka, la propra opinio estas ĝusta kaj ĉiuj, kiuj ne komprenas ĝin, estas neinformitaj idiotoj. Ne malofte pensas reprezentantoj de ĉi tiuj ideoj, ke vere la ekstera mondo estas malvastmensa kaj ne povas pensi en novaj vojoj.

Feliĉe, ekzistas bonega testo por spirita miopeco. Malfermaj homoj havas la kapablon pesi la argumenton unu kontraŭ la alia kaj diri: “unuflanke tiel ... aliflanke ... ĉi tiel”. Al malvastemaj homoj mankas tiu kapablo. Ili ja estas ekstreme elektemaj kiam devas elekti inter faktoj. Ĉio, kio subtenas ilian fidon estas uzata kiel argumento, dum tio, kio kontraŭdiras ilian opinion estas forigita.

Kaj kompreneble estas grave foje pridubi sian propran malfermitecon per

la demando: *“Ĉu mi aŭskultas argumentojn, kiuj parolas kontraŭ mia opinio?”*

Malvastperspektivo estas problema

Miopeco ofte baziĝas sur malsekureco kaj timo. Kompleksa pensado kreas necertecon kaj pridemandadon pri propraj kaj alies perceptoj. Tio povas krei streĉon kaj timon. La malvastperspektivaj homoj evitas necertecon kaj simpligas la mondon kaj preferas vidi ĝin nigre kaj blanke.

Ili ofte timas ŝanĝon. ”Estis pli bone antaŭe” ili ofte komentas kaj kredas ke oni pli bone vivis en la pasinteco. Sed vere temas pri timo pri la nekonata.

Troviĝas ligo inter malvastemo kaj antaŭjuĝo. Kiam individuoj kun malfermita menso komprenas kaj respektas ke aliaj homoj povas esti malsamaj – havi malsamajn preferojn, pensojn, manierojn vivi ktp. la malvastperspektivaj ofte perceptas aliajn, kiel malpli valorajn. Ili ofte havas striktajn normojn pri kiamaniere aliaj homoj devas pensi kaj agi. Diferencoj estas konsiderataj kun abomeno.

Miopeco ŝuldas al antaŭjuĝo, maltoleremo kaj manko de perspektivo. Ĝi ne estas facila mortomerita peko kontraŭstari kaj ĝi estas tre disvastigita inter ni homoj. Ofte mankas memkompreno. Sed samtempe tiom grave ke ni provu malgrandigi la malutilajn efikojn de ĝi. La unuan demandon mi starigu al mi mem: Ĉu mi volas esti saĝa aŭ malsaĝulo? Poste esploru la mensajn terenojn, kie via miopeco prosperas kaj tiam alproksimiĝu al aliaj vidpunktoj kaj opinioj.

Tiranemo / ĉikanemo

(Agoj kiuj celas subpremi aliulojn. PIV: Intence fari al iu maljustajn ĝenojn, malagrablaĵojn, malhelpojn por sentigi al li/ŝi sian superecon)

Signife pli da viroj ol virinoj konsideris ke ili havas tiun trajton kaj signife pli da junuloj (- 40 jaroj) ol pli aĝaj (40+) konsideris ke ili havas la econ.

Ĉikananto estas homoj, kiuj sentas, ke ili kreskas reduktante aliajn. (El la intervjuoj)

Vi neniam atingos la plej altajn pintojn se vi devas puŝi malsupren aliajn survoje. (Jeffrey Benjamin)

Ĉikanado signifas malplivalorigi aliajn kaj provi damaĝi ilin, fizike aŭ mense. La trajto ne estas inter la originaj sep mortomeritaj pekoj. Ankaŭ ne ekzistas klara rilato al la plej gravaj mesaĝoj de la ĉefaj religioj. Unu kialo por

Esploro pri novaj mortomeritaj pekoj

La sveda kuracisto kaj profesoro Stefan Einhorn esploris, uzante enketilojn kaj profundajn intervjuojn, ĉe pli ol mil personoj, kiujn ili opinias, kiuj estas hodiaŭ la plej malbonaj trajtoj de homoj – la novaj mortomeritaj pekoj.

Samajn metodojn li uzis por esplori la plej bonajn trajtojn de homoj.

La rezulto de tiu esploro mi prezentas en serio en kelkaj numeroj de Dia Regno. La unua parto estis publikigita en numero 1/2025.

tio povas esti, ke la opinio pri ĉikanado ŝanĝiĝis dum la tempa evoluo.

Hierarkiaj strukturoj estis multe pli klaraj dum antaŭaj tempoj kaj daŭre troviĝas en kelkaj socioj hodiaŭ. Tiu nocio, ke ĉiuj homoj havas egalan valoron kaj oni ne rajtas malbone trakti aliajn homojn, nur efikis en modernaj tempoj. Sklaveco estas unu el la plej malbonaj formoj de ĉikanado.

Malverŝajne, ĉikanado estus inter la novaj mortmeritaj pekoj en socioj kun pli forta hierarkiaj strukturoj. En tiaj socioj, la akcepto de ĉikanado estas pli granda ĉar ĝi estas konstruita kiel natura parto de la sistemo. Sed en nia kontraŭaŭtoritata socio ne ekzistas tia toleremo, kaj tio faras ĉikanadon unu el la plej malestimataj trajtoj.

Ĉikanado en lernejoj kaj laborlokoj estas tro oftaj por esti ignorataj. "Elfrostigado" estas formo de ĉikanado. La viktimo ne estas invitata esti membro en grupo aŭ partopreni en diversaj agadoj. Formiĝas bobelo ĉirkaŭ la elfrostigata persono, kio povas ruinigi lian aŭ ŝian memestimon.

En la pasinteco, la viktimo ricevis tre bezonatan paŭzon de la ĉikanado kiam la lernejo aŭ labortago finiĝis. Hodiaŭ troviĝas la sociaj medioj surrete kaj ili funkcias tagnokte. "Ciber"-ĉikanado estas kreskanta problemo.

Eĉ pli malfacila estas la ĉikanado, kiu okazas inter la muroj de la hejmo. Precipe malfacila formo de ĉikanado estas kiam iu uzas sian potencon por fizika misuzo, sed eĉ la mensa ĉikanado povas esti terura kaj kaŭzi severajn vundojn al partneroj kaj infanoj.

Troviĝas ĉikanantoj kiuj agas sola dum aliaj dependas de "kortego" kiu admiras kaj subtenas la ĉikananton. Tiuj, kiuj tiamaniere ebligas al la ĉikananto agadi ankaŭ havas grandan respondecon. Ili ne povas sin kaŝi kaj senkulpigi per: "Mi simple faris kiel ĉiuj aliaj."

Troviĝas tri ĉefaj kialoj por ĉikanado: timo, malsekureco kaj potenco. Kaj do, kompreneble, emo de sadismo kaj manko de empatio. Kelkaj, kiuj okupiĝas pri ĉikanado estas esence malsekuraj, kaj metante homojn sub sin en la hierarkio estas maniero plifirmigi sian propran pli superan pozicion kaj tiel senti sin superulo aŭ pli grava. Sed tio ja estas falsa supereco.

Kion ni povas fari

Ĉikanado estas ago celanta subpremi alian homon. Terura trajto, kiu kompreneble ankaŭ influas la ĉikananton. Bedaŭrinde estas malfacile influi kaj kontraŭagi la ĉikananton, ĉu li agas malgrandskale aŭ en pli granda kunteksto.

Estas pli facile influi tiujn, kiuj estas pasivaj aŭ ĝojkrias kiam la ĉikananto agas. Sen publiko la plej multaj ĉikanantoj fariĝas etulo kiu kaŝiĝas malantaŭ sia sinteno. Se ni finas subteni kaj kuraĝigi la ĉikananton, ĉu en la lernejo, ĉu en la laborejo aŭ per la amaskomunikiloj, ni helpos haltigi gravan socian problemon. Kiu volas vivi en socio, kie la ĉikananto povas agi libere?

La Kristo de la Andoj

Elĉerpaĵo el raporto donita al la antaŭa unio de la Ligo de Nacioj

Profesoro Gilbert Murray, UK

Ĉe la plej alta punkto sur la landlimo inter Argentino kaj Ĉilio staras grandega figuro de Kristo, 4 000 metrojn alte en la Andoj. Sub ĝi estas skribitaj la vortoj: “Ĉi tiuj montoj mem falos kaj polveriĝos antaŭ ol la popoloj de Ĉilio kaj la Argentina Respubliko forgesos sian sanktan interkonsenton, kiun ili ĵuris ĉe la piedoj de Kristo.” Sur la alia flanko sin trovas la vortoj: “Li estas nia paco, kiu unuigas nin.”

Iam estis longdaŭra disputo inter Argentino kaj Ĉilio pri la landlimaj regionoj. La du nacioj staris pretaj por ekmilitadi.

Sinjoro Benavente, argentina episkopo, predikis en Buenos Aires pasian alvokon por la paco en la nomo de Kristo. Trans la Andojn rapidis la novaĵo pri tio, kaj ĉilia episkopo akceptis la alvokon. La du episkopoj tuj ekvojaĝis, ĉiu en sia propra lando, irante de vilaĝo al vilaĝo, por prediki pacon kaj reakordiĝon.

Finfine la landlima problemo estis solvita laŭ propono de la brita reĝo Eduardo VIIa, kaj la du registaroj faris inter si senkondiĉan traktaton porpacan. La granda militila fabrikejo en Ĉilio rekonstruiĝis kiel grava teknika lernejo, kaj la sparita mono estis uzata por publikaj konstruaĵoj, fervojoj kaj la domkonstruado. Plej grave el ĉio estis la aliiĝo de la sinteno de la du nacioj favore al fido kaj bonvolo.

La kanonojn de la landlimaj fortikaĵoj oni malmuntis, la metalon oni fandis en la militfabrikejo en Buenos Aires, kaj muldis en grandan bronzan figuron de Kristo. La registaro mem portigis ĝin supren 4 000 metrojn gis la supro de la monto. Tie, la 13an de marto 1904, oni dediĉis gin al la mondo antaŭ grandega homamasoj venintaj de ambaŭ flankoj de la landlimo. La statuo estis senvualigita en profunda silento, kaj je la sunsubiro la du popoloj kune ekpreĝis por la paco de la mondo.

Ĉu ni en Eŭropo povos fari tion kion jam faris la sudamerikanoj?



Elĉerpo el Vikipedio

Anda Kristo estas monumento de Kristo la Redemptoro, inaŭgurita en marto 1904 en montopasejo Bermejo en Andoj, sur lima linio inter Argentino kaj Ĉilio.

En komenco de la 20-a jarcento la papo Leono XIII direktis vicon da enciklikoj, kie li petis pacon, konkordon kaj fidelecon al Kristo la Redemptoro. Ankaŭ povis komenciĝi milito inter Argentino kaj Ĉilio pro kontraŭopinioj pri landlimo. Pro tiuj kaŭzoj la episkopo de Cuyo, promesis publike konstrui statuon al Kristo, kiu memorigos pri lia testamento observi pacon. La statuo alta je 7 metroj estis farita kaj oni konservis ĝin kelktempe en ekspozicio en korto de la lernejo Lacordaire en Bonaero.

En tiun lernejon venis Asocio de kristanaj patrinoj, kies prezidanto estis Ángela Oliveira Cézar de Costa. Ŝi opiniis, ke estus pli prave instali la statuon en Andoj, sur la limo inter du landoj, se ili subskribus pactraktaton. Ŝi konis la prezidanton de Argentino kaj sukcesis interesigi la registarojn de ambaŭ ŝtatoj pri la projekto.

En majo 1902 Argentino kaj Ĉilio subskribis pactraktaton. Kun la episkopo Benavente ŝi petis transigi la statuon en provincon Mendozon, por instali ĝin en la monta pado.

En 1904 oni transigis bronzajn pecojn de la statuo je 1200 km per trajno, kaj poste levis ilin per muloj sur supron de la monto, je 3854 m super marnivelo. La 13-an de marto 1904 tri mil argentinanoj kaj ĉilianoj venis al inaŭguro de la monumento, malgraŭ ĝi situis en dezerta loko. Ankaŭ venis la armeoj de ambaŭ landoj, kiuj antaŭ nelonge intencis militi.


Oni inaŭguris dum la ceremonio du memorajn tabulojn. Sur unu tabulo la latinlingva skribo diras: "*Ipse est pax nostra qui fecit utraque unum*" [Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ, Ef. 2:14].

Oni restaŭrigis la statuon en 1916. Kaj oni poste inaŭguris kelkajn memorajn tabulojn. Unu el ili, inaŭgurita en 1937, havas la frazon: "*Estas pli ebla, ke ĉi tiuj montoj ruiniĝos, ol ke la argentinanoj kaj la ĉilianoj rompos la pacon, al kiu ili ĵuris ĉe piedoj de Kristo la Redemptoro*".

La 13-an de marto 2004 la argentina prezidanto Néstor Kirchner kaj la ĉilia prezidanto Ricardo Lagos renkontiĝis apud la monumento, ke solenu 100 jarojn post ĝia inaŭguro.

ꟽ

Gilbert Murray



La apuda teksto troviĝas en malgranda faldfolio, kiu estis verkita iam post 1937 fare de profesoro Gilbert Murray.

Edmond Privat skribas pri sekvontjara UK en Oksfordo en la gazeto ESPERANTO en 1929, ke prof. Murray "ageme apostolas kontraŭ milito kaj eĉ subtenis Esperanton ĉe la Ligo [de Nacioj], ĉar li komprenas la neceson pri plena egaleco inter ĉiuj nacioj, grandaj aŭ malgrandaj."

Unu el liaj daŭraj heredaĵoj estas, ke li estis origina kaj aktiva membro de la Oksforda Komitato por Malsatkatastrofa Helpo [*Oxford Committee for Famine Relief*], fondita en 1942, kiu poste fariĝis OXFAM.

Mi ne trovis informon ĉu li estis esperantisto aŭ nur apoganto. /Red.

Organizanto:
Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a.
Landa sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI).
Prezidanto: pastoro Wolfram Rohloff,
Am Marktplatz 82,
D-09496 Marienberg-Zöblitz

Partopren-kotizoj:
La prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en 2-lita ĉambro (surteraj litoj) kun duŝo/necesejo, ekskursa programo 295 €, por ĉiu persono (post 2025-11-30: 310 €).
Rabatoj: Loĝantoj en eksterlando: -75 €; en Germanio loĝantaj KELI-membroj: -25 €.
Krompago por 1-lita ĉambro (entute): +60 €.

Programo
Teologia temo: (Wolfram Rohloff).
Komuna preĝado kaj kantado per "Adoru" (muzika kadro: Stefan Lepping). Ĵaŭdon ĝis sabato: Turismaj ekskursoj (Ulrich Matthias). Aktualajn detalojn vidu en la Interreto: www.esperanto.de/keli.

Nia kunvenejo
Loreley-Jugendherberge
Bismarckweg 17
D-56329 St. Goar
Tel. 0049 6741 388
www.jugendherberge-St-Goar.de
Situo: ĉ. 700 m de la stacidomo

Bibliaj Tagoj
en St. Goar ĉe l' Rejno
de 2026-02-25 ĝis 2026-03-01
(merkredo - dimanĉo)



Urbocentro kun rigardo al la kastela ruino Rheinfels. Foto: © TI St. Goar

Kondiĉoj de aliĝo
Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 40 € kaj estos konfirmata post ricevo. La reston de la kotizo ĝiru ĝis la **19a de decembro 2025**. Aliĝoj post tiu dato nur eblos, se estos liberaj lokoj.

La antaŭpago estos repagata, se vi aligas anstataŭanton (samseksan). Tiu, kiu nur pro financaj kaŭzoj ne povus partopreni, petu subvencion de la Fondaĵo de Familio Fischer.

Ajnajn demandojn kaj petojn direktu al la
komisiito por organizado kaj financoj
Rudolf Fischer, Amtmann-Daniel-Str. 11c, D-48356 Nordwalde
☎ 0049 2573 / 626 und 0049 152 075 175 26
💻 fischru@uni-muenster.de

Jen mi aliĝas definitive al la Bibliaj Tagoj
de 2026-02-25 ĝis 2026-03-01 en St. Goar.

(titolo+)nomo: _____

strato/domnum.: _____

kodo, urbo: _____

telefono: _____

poŝtelefono: _____

retpoŝta adr.: _____

membro de KELI kun “Dia Regno” ☐ jes ☐ ne

vegetarano ☐ / laktozo ☐ / ceteraj limigoj ☐:

_____

☐ Mi jen mendas 2-litan ĉambron kune kun:

Nomo: _____

vegetarano ☐ / laktozo ☐ / ceteraj limigoj ☐:

_____

☐ La sumon de _____€ mi ĝiris je _____ (dato)

al la sekvanta konto:

☐ Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel
IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC GENODEF1EK1

☐ UEA-konto de Rudolf Fischer: rfis-w

Rimarkigoj / proponoj:

_____

_____

Bv. Sendi la suprajn datumojn paperpoŝte aŭ elektronike al la komisiito

En li, Kristo, la unu

IN ILLO UNO UNUM



IN ILLO UNO UNUM • devizo de papo Leono la 14a • latina T: Aŭgusteno laŭ Paŭlo • M kaj E-adapto: Albrecht Kronenberger 2025-05-27.

1 Kor 12,12-13 • Efe 4,5

Jen la origina citaĵo el Aŭgusteno:

Nos multi in illo uno unum.

Enarrationes in Psalmos 127,3